

Brazilei

jaro 2 n-ro 6 2008

Invado de bildstriaaj herooj



Parolo de
spertulo:
Katalin Kováts



ilei

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Faka asocio pri instruado aliĝinta al
Universala Esperanto-Asocio (UEA)
www.ilei.info



Brazila Sekcio de ILEI

Provizora Sekciestro: Joseo Tenorjo
Sekretariino: Conceição Rodrigues
Kasisto: Joel Afonso Francisco

Brazila Sekcio de ILEI funkcias
ĉefe per interreto ĉe la adreso
www.ileibr.org
geinstruistoj@ileibr.org
biblioteko@ileibr.org
butiko@ileibr.org

Poŝtadreso por korespondado

Rua Francisco Garcia, 168 - Itaquera
08230-560 São Paulo, SP - Brazilo
Telefono: (11) 6155-7978

Brazilei

aperas kvarfoje jare kaj estas eldonata
de Brazila Sekcio de ILEI

ĉefredaktanto: Joseo Tenorjo
grafikaranĝo: Joseo Tenorjo
kontakto: revuo@ileibr.org
kontrollegantoj: José Dias Pinto,
Eurico A. Ribeiro, Edson Ponciano.

Kunlaboris en tiu ĉi numero: Katalin Kováts, Paulo Sergio Viana, José Dias Pinto, Adriana Pavani, Aloísio Sartorato, Paulo Nascentes, Odília Milhomens, Edson Ponciano, Zlatko Tišljar, Ulysses Baldez, Osmar da Silva Alves, Martin Weichert, Eder Benedetti.

Eldiroj

“La plej bona instruisto estus tiu, kiu retenas ĉe si nek la povon nek la konon, sed kiu pretas fordoni la povon cele havigi la multoblan konon. Tiaokaze perdi estas ia gajno kaj la kono ia rekomenco.”

Afonso Romano de Sant’Anna,
brazila verkisto



“Oni devas eniri la socion ne per belaj prelegoj, sed per videblaj faktoj, kiuj celtrafu la atenton de la eksteraj aŭskultantoj.”

Itala pastro Duilio Magnani, laŭreato de la “esperantista pacpremio” Deguĉi 2008, (Esperanto, feb 2008).

“Kun la espero, ke per tiu ĉi laboro la teamo kontribuis al pli kvalita kaj pli moderna instruado de la internacia lingvo, al plisistema kaj internacie normigita pritaksado de niaj lingvokapabloj, kaj al la akceptigo de Esperanto kiel socikultura kaj lingvopolitika fakto, Eŭrop- kaj mond-nivele, ni donacas ĝian rezulton al Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj al la uzantoj kaj instruantoj de la internacia lingvo tutmonde.”

Katalin Kovats, redaktoro de la porinstruista retejo **edukado.net**, alude al la Referenckadro-projekto.





Enhavo

Parolo de spertulo

D-ino Katalin Kováts 06

Valoro de bildliteraturo (2-a parto)

Bildstriaĵoj herooj ekinvasas lernoĉambrojn 16

Claude Piron

Lasu min funebri plu 26

Trejnaranĝo por kursgvidantoj de E-o 24

Kiel trakti idojn — Kiel trakti lingvolernantojn 28

Tradukprojekto pri infanlibroj 30

Platona Amo — Eternaj komencantoj 32

Ges-roj Blanke intervjuiĝas ĉe TV Supren 35

Lernado daŭras 36

Esperanto en la Bibliotekojn 37

Venis nova sento 38

Instrui al tria-aĝuloj 42

Traduko-defio 43

Kaŝu viajn retkontaktojn 50

Leteroj 04

Karaj geinstruistoj 05

La Sekcio interne 14

Notinde 31

Fajnoj de la metio 46

Pliriĉigu vian vortprovizon 47



LETEROJ

“Estas plezure povi vidi aferojn tiel bone faritajn. Al mi tre plaĉas la bonorda paĝarango kun la necesaj informoj, sen eksceso.”

Eni Alvim de Oliveira,
São José dos Campos/SP

“Tiu revuo de Brazila ILEI-sekcio estas tute mirinda kaj meritas esti pli vaste konata.”

Osmo Buler, Direktoro de
EUA-oficejo, Nederlando

“Tre karaj, mi ĵus ricevis vian interesan revuon, kiu tute ne postrestas la IPR. Gratulojn. Mi ŝatus ricevi ĝin estonte kiel aldonaĵon (...)”

Bardhyl Selimi, Albanio

“Mi skribas al vi nur por danki vin pri la revueto Brazilei, kiun vi bonvolis sendi al mi. Ĝia enhavo meritas tre vastan diskonigon inter ĝeinstruistoj de Esperanto ne nur brazilaj.”

Renato Corseti, eksa
prezidanto de UEA, Italio

“Al mi tre plaĉas Brazilei-organo.”

Sérgio da Costa Coelho,
São José dos Campos/SP

“Mi gratulas la skipon de ILEI-br pro la serioza laboro favore al nia kara lingvo.”

Hary Milton L. Ferreira,
Goiânia/GO

“Mi kun granda intereso tralegis ambaŭ revuojn. Ili havas multajn utilajn, por mi, artikolojn. Precipe al mi plaĉas la konsiloj pri vortaroj kaj paroligo-metodoj. Mi provos uzi ilin en mia studado de la angla kaj Esperanto.”

Yuri Manyahin, Rusio

“Lastatempe la Movado riĉiĝis per 3 “atutoj”: la libro “Vojaĝo en Esperanto-Lando”, de Boris Kolker; “PMEG”, de Bertilo; kaj la revuo “BRAZILEI”. Gratulon pro la bonega revuo!”

Jair Salles, Rio de Janeiro

“Mi tre ŝatas la revuon Brazilei. Mi volas rememriĝi por 2008.”

Marly Freitas da Silva,
Rio de Janeiro

NdR.: Brazilei estas senpage dissendata al membroj de la Sekcio. Tial aliĝoj kaj apartaj abonoj estas ĉiam bonvenaj. Dankon!



Geinstruistoj

Per pacienco venas scienco

Jen la unua ĉi-jara numero de Brazilei. Kiel vi jam rimarkis, ni dediĉas la lastan kovrilon al nia nova partnero *edukado.net*, cele memoriĝi vin pri tiu vizitinda porinstruista retejo. Konatiĝu iom pli kun ties agado per intervjuo kun ĝia redaktoro (p. 6). La duan parton de la artikolo pri bildliteraturo vi povas legi sur p. 16. La lasta kaj praktika parto de tiu artikolo-serio aperos en la sekva n-ro de la revuo. De nun du novaj bildstrioj vizitos vian lernoĉambron: *Gogo la testudo*, de la germano Martin Weichert, kaj *Ed & Pris*, de la brazilano Eder Benedetti (p. 25). Notu la sugestojn senditajn de nia kunlaboranto Paulo Sergio Viana pri kiel trakti lingvolernantojn (p. 24). Kuncerbumu pri la malapero de nia svisa dojeno (p. 26). Nia kunlaboranto José Dias Pinto (p. 32) pensigas nin pri kiom multe preterlasas komencantoj, kiuj timas transpasi la rubikonon de elementa lernolibro. Regalas nin per kursejaj spertoj la membroj Odilia Milhomens (p. 36) kaj Adriana Pavani (p. 42).

Laste ni invitas vin al la 3-a traduko-defio, sur paĝo 43, kun libro-premio por la plej bona traduko-propono.

Agrablan legadon!

La retejo *www.edukado.net* de pli ol ses jaroj staras kiel lumturo sur nia eduka panoramo, ĵetante klerigajn kaj didaktikajn lumojn sur plej forajn angulojn de la tutmonda esperantista komunumo. La ĉefa bruligaĵo de tiu lumo estas la entuziasmo, sindediĉo kaj multjara sperto de la pedagogino Katalin Kováts.

La paĝaro estis lanĉita la 15-an de decembro 2001 kaj tute renovigita en 2005 kun multaj novaj funkcioj kaj ebloj. Nuntempe 1534 homoj estas membroj de la porinstruista retejo, kies ĉefa celo konsistas el kunlaborado inter Esperanto-instruistoj kaj el disponigo de helpiloj por memlernantoj. La sekcioj **Metiejo**, pedagogia ateliero laŭ foruma formato, kaj **Lerniloteko**, bunta kolekto de ekzercaroj, estas la gravaj pilaroj, nur por citi du el la multaj sekcioj. La membroj de *edukado.net* privilegie korespondadas kun ties redaktoro kvazaŭ ili partoprenus en ia interreta pedagogia trejnkurso.

En la ranglisto de la membraro de *edukado.net*, Brazilo aperas en la dua loko kun 189 membroj. Malgraŭ tiu pozicio, brazilaj kunlaboraĵoj apenaŭ videblas tie. Legu la intervjuon, per kiu Katalin Kováts afable kaj kuraĝige regalas la legantojn de Brazilo, kaj ekpensu pri kiel niaj enlandaj instruantoj povas pli aktive kontribui al la lum-bruligado de tiu unika lumturo de nia tutmonda porinstruista agado.

Fonto de la supraj kaj apudpaĝaj informoj: www.edukado.net, wikipedia.

spertulo

D-ino **Katalin** Kováts



Estas hungardevena filologo, naskiĝis en Budapeŝto en 1957 kaj ekde 2001 loĝas kaj laboras en Nederlando.

Lingvisto kaj metodikisto, havinta postenon en hungara universitatranga katedro pri aplikata lingvistiko, diplomita lingvoinstruisto pri Esperanto (ELTE-Budapeŝto), itala kaj rusa lingvoj. Doktorigis pri la propedeŭtika valoro de Esperanto kaj jam gvidis pli ol cent E-kursojn kaj trejnseminariojn en diversaj partoj de la mondo.

Kunlaboras kun Monato. Estis vicprezidanto de la ekzamena komisiono de ILEI kaj dum pli ol 10 jaroj vicedaktoro de ties organo Internacia Pedagogia Revuo (IPR).

Kiel verkisto ŝi aŭtoras kelkajn lernilojn kaj librojn (foje sub la nomo Katalin Smidéliusz): **Memorlibro omaĝe al Andreo Cseh, Ĉu vi aŭdis ke...** (libro+sonmaterialo), **Manlibro pri Instruado de Esperanto, Poŝamiko**.

Nuntempe ŝia plena (preskaŭ tag-nokta) okupo estas la redaktado de la porinstruista retejo www.edukado.net sub la rekta kunlaboro de sia edzo Sylvajn kaj de siaj gefiloj Martin kaj Petra, kunhelpe de pluraj aliaj amikoj kaj kolegoj.



Foto: Vikipeĉo

Albert Schweitzer
(1875-1965)

Germana
teologo, misiisto
kaj kuracisto
laŭreato de la
nobelpremio pri
paco en la jaro
1952.

Brazilei: Kiam kaj kiel vi ekinteresiĝis pri lingvoinstruado?

Katalin Kováts: En mia familio de multaj generacioj estis preskaŭ nur pedagogoj, sekve tio estus miraklo, se mi estus nun ne instruisto. Ĝuste lingvojn malmultaj instruis el ni, eble tio estas la novaĵo en la generacia ĉeno, sed mia filino zorgos pri la daŭrigo ankaŭ de tiu flanko.

Brazilei: Kiu verko aŭ aŭtoro multe influis vian formiĝon kiel edukiston?

Katalin Kováts: Malfacila demando, precipe ĉar mi estas pli praktika ol teoria homo. Sekve personaj renkontiĝoj lasas en mi la plej profundajn spurojn. Mi memoras kelkajn bonegajn kaj kelkajn malbon(eg)ajn instruistojn el mia studtempo, kaj la admiro kaj malamo al ili kaj ilia instrumentado formis min kiel edukiston.

Sekvi la bonajn kaj eviti la malbonajn ekzemplojn estas unu el miaj gvidlinioj. Multe da energio donas ankoraŭ biografiaj romanoj aŭ filmoj, ĉu pri scienculoj, ĉu pri artistoj k.s.. Tiuj ĉiam inspiras min. Mi menciis nur **Albert Schweitzer** kaj **Vincent van Gogh** el kies vivo mi lernis amon kaj helpemon al homoj, persiston en laboro, multflankecon kaj fanatikecon pri tio, por kio mi sentas min destinata. Sed la listo povus esti ja multe pli longa.

Brazilei: En kiuj Esperanto-terenoj vi povis utiligi viajn instruspertojn antaŭ ol eklabori pri *edukado.net*?

Katalin Kováts: Mi estas lingvisto kaj dum jardeko en altlernejo kaj universitato en Hungario trejnis estontajn lingvoinstruistojn, inter aliaj pri la rusa kaj itala lingvoj. En la sama medio mi trovis eblon lanĉi ankaŭ E-fakon kaj en pli ol 500-hora programo formi ankaŭ E-instruistojn dum kelkaj jaroj. Pli ol cent lingvokursoj kaj seminarioj dise en la mondo

Vincent van Gogh
(1853-1890)



Miemporetro, Van Gogh

Nederlanda
pentristo kiu
originale influis la
pentradon de la
20-a jarcento kaj
kiu, dum sia tuta
vivo, sukcesis vendi
nur unu el siaj
pentraĵoj nuntempe
aprecataj en la tuta
mondo.

(fakte ĉie krom Sud-ameriko!) vidigis al mi kiel mi povas plej efike helpi kaj atingi ankaŭ tiujn lokojn kaj personojn, al kiuj mi ne povas mem vojaĝi.

Brazilei: *Edukado.net* lanĉiĝis antaŭ 6 jaroj kiel kovujo por diversaj instruprojektoj. Ĉu la retejo plu evoluos tia, aŭ ĉu via laboro riskas iĝi parto de pli ampleksa edukprojekto?

Katalin Kováts: Fakte la kreo de tiu retejo estis mem unu granda projekto, kiu transformiĝis je giganta, mondskala metiejo de instruantoj de Esperanto. Kadre de tiu retejo mi efektivas virtualan trejnadon kaj subtenadon de ĉiuj, kiuj bezonas helpon aŭ volas sekvi en unu loko la novaĵojn kaj evoluon de la Esperanto-instruado. Ampleksiĝo kompreneble estas, sed mi ellaboras pli kaj pli da novaj servoj kaj sekcioj nur kadre de la sama projekto.

Brazilei: Kiu estas la plej vizitata paĝo de la retejo?

Katalin Kováts: La plej populara sekcio estas la LERNILOTEKO . Ties preskaŭ 500 ekzercoj havas 80 mil elŝutojn kaj 1200 opiniojn de la uzantoj. Oni tre ŝatas ankaŭ la *Katalogon* kaj multajn vizitojn havas ankaŭ *Koresponda Servo*, la plej granda kaj efika tiutipa kontaktigilo en Esperantio. La paĝaro havas plurajn aliajn tre utilajn sekciojn, sed tiujn ankoraŭ multaj ne malkovris.

Brazilei: Kiel redaktoro, kiu estas via preferata paĝo kaj kiu estas la plej temporaba?

Katalin Kováts: Miaj du dorlotinfanoj estas la *Lerniloteko* kaj la sekcio *Monda Mozaiko*. La produkto aŭ akiro kaj redaktado de materialoj por tiuj du sekcioj prenas la plej multe da tempo. Bonŝance kelkaj membroj de la paĝaro helpas min. Plej multe ni laboras pri la artikoloj de *Monda Mozaiko*. Ili estas ne nur raportoj pri strangajoj de la mondo, sed ankaŭ ekzercoj





kaj sonmaterialoj. Ilin ni pretigas ofte dum tuta semajno, kompreneble paralele kun aliaj taskoj kaj laboroj. Tage horojn mi dediĉas por korespondado kaj konsilado de la membroj, same tre grava laboro, sed tute ne videbla sur la paĝaro mem.

Brazilei: *Manlibro pri Instruado de Esperanto*, kiun vi redaktis, se ĝisdatigata de tempo al tempo, okaze de nova represo, povus fariĝi la verda biblio de la tutmonda instruistaro. Novaj vizitantoj de la retejo tamen apenaŭ scias pri tiu grava verko, kiu iĝis plia kaŝita ero en la katalogo de la retejo... La verko, kiu kaŝiĝas ankaŭ en la vasta katalogo de UEA, ne plu akireblas ĉe ILEI, la eldoninto. Kial la kaŝo de tiel grava verko?

Katalin Kováts: La *Manlibro* estis iuspeca “vikipedieca” komuna laboro de kelkaj volontuloj. Sekve akumuliĝis tre diversnivela kaj diversaspekta aro de kontribuaĵoj. Necesis homogenigi la erojn kaj plenigi la mankantajn breĉojn por ke la tuto povu esti utila helpilo en la manoj de ne profesiaj instruistoj de la lingvo. Kiam mi transprenis tiun laboron, mi mem ne imagis, kiom granda tasko ĝi fakte estas. Necesis verki multajn artikolojn kaj marĉandi pri la enhavo de la jam ekzistantaj eroj kun ties aŭtoroj. La verko tamen estas eldonaĵo de ILEI kaj E@I, kaj mi mem – ricevinta kelkajn honorekzemplerojn – ne plu havas eblojn kaj rajtojn ion ajn decidi pri ĝi. Mi helpis kondiĉe ke la materialo povu esti elŝutebla el edukado.net, por kio mi ankoraŭ ne ricevis la teknike uzeblan PDF-formaton de la libro. Do, nun aperas ĉe mi nur tiuj ĉapitroj, kiujn mi jam sukcesis mem reenpaĝigi. Ĝi ne speciale estas kaŝita, kiel vi tion supozas. ILEI simple ne bone reklamas ĝin, kaj eble ne konscias pri ĝia utilo en la manoj de ne profesiaj, tamen instruemaj, samideanoj dise en la mondo. Necesus bona informado kaj reto de distribuantoj. La reklamon mi mem povus fari, sed tio estus vana laboro, se ILEI ne disponigas la libron mem. Ĉiukaze, se venus kelkaj rektaj demandoj pri tio, mi prenos tempon por aranĝi la retan publikigon de la tuta libro.

Brazilei: Malkiel la *Manlibro*, la furora libreto *Poŝamiko* estas verko kompilita el materialo de la retejo mem. Post tiu dua redaktosperto,


ĉu vi kredas, ke *edukado.net* survojas al eldonado de propraj verkoj kun starigo de propra libroservo?

Katalin Kováts: La libreton *Poŝamiko* mi kreis kun la helpo de mia koleginino Beatrice Allée. La ĉefa celo estis disponigi uzeblan kaj plaĉan materialon dum niaj paroligaj kursoj, okazigataj dum la Universallaj Kongresoj. La 500 unuaj ekzempleroj tuj en Florenco rapide forvendiĉis. Post tio ĝi aperis en pluraj okazoj jam en pliaj 2500 ekzempleroj, kaj verŝajne tamen ne sufiĉos la kvanto por Roterdamo.

Ni tre ĝojas pri tio, tamen la ĉefa celo de la retejo estas ne la papera eldonado, sed reta disponigo de instrumaterialoj. Cetere mi sola, la unupersona teamo, ne kapablas pliajn agadojn entrepreni. Se ni tamen produktos ankoraŭ librojn, tio estos, ĉar niaj uzantoj petas tion kaj ankaŭ la ne-retumantoj volas profiti el nia laboro. Tial eble baldaŭ aperos alia eldonaĵo, kolekto de la plej popularaj artikoloj de *Monda Mozaiko*, kun ekzercoj kaj sonmaterialoj.

Brazilei: La pasintan januaron vi anoncis, ke aliĝis al la retejo la 1500-a membro. Kion tiu ronda cifero signifas por vi, kiel redaktoro de la paĝaro, kaj kion ĝi signifas por la tutmonda esperantista komunumo?

Katalin Kováts: ILEI havas ĉ. 400-500 membrojn kun kiuj ĝi havas kontakton pere de sia revuo IPR kaj jare unufoja kongreso. Plia subteno de la membroj kaj ties kvalito dependas de la landaj asocioj. Ne pro ĝentileco, sed mi devas diri al vi, ke en neniu lando mi vidis tian altkvalitan agadon de ILEI-sekcio, kia nun disvolviĝas ĉe vi, ekzemple pere de la retejo kaj de via faka, kolora, praktika kaj utila eldonaĵo. Gratulojn. Sed en multaj aliaj landoj la ILEI-membroj restas izolitaj kaj devas aktivi senhelpe. Male al tio, la membroj de *edukado.net* havas ĉiutagan kontakton venantan de la redaktoro, jam kvazaŭ persona konato al ĉiu membro. Ili ricevas mesaĝojn kun informoj, novaĵojn, subtenon kaj konkretan helpon. Ili sentas sin parto de vera, vivanta komunumo, kaj tio tre gravas ĉefe por la diaspore agantaj instruistoj. El la 1500 membroj de *edukado.net* (kiuj devenas el 97 landoj) pli ol la duono tre regule konsultas la paĝaron, profitas el ties materialoj kaj pli kaj pli el ili ankaŭ kontribuas siamaniere per ekzercoj, ideoj, demandoj kaj opinioj.





Brazilei: Ne eblas paroli pri edukado.net sen menciigi la grandan atingiĝon, la organizon de la Esperanto-traduko de la “*Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado, pritaĝado*”. La fundamenta verko de la Konsilio de Eŭropo proponas novtipajn lingvoekzamenojn konforme al la novaj lingvotestaj normoj de la konsilio. Ĝis kia nivelo de internacieco aplikiga la mezurado de lingvaj kapabloj surbaze de la ellaborita taksosistemo de la Referenckadro?



Katalin Kováts: Tiu traduko estis tre granda lingvopolitika sukceso, ĉar la Esperanto-traduko de la dokumento estas nun oficiale listigita sur la hejmpaĝo de la Konsilio de Eŭropo kaj nia teamo estas invitata al kunvenoj kaj partoprenas en laborgrupoj de la instanco. Kadre de tiu laboro kaj helpe de la dokumento la respondeca teamo nun estas ellaboranta la novtipan internacian ekzamenon de UEA-ILEI, kiu – kvankam nomiĝas Eŭropa – estos uzata tutmonde kaj certe helpas la objektivan kaj laŭnorman taksadon de kursoj, materialoj kaj lingvoatingaĵoj.

Brazilei: Kiel vi mem substrekas, la unua praktika utiligado de la menciita tradukprojekto, plejparte plenumita de Roel Haveman, estas la faka terminaro norme sekvinda kaj aplikinda en ajna ekzamsistemo pri Esperanto. Ĉu oni intencas kompili kaj aperigi tiujn fakajn terminojn kiel apartan dokumenton cele al pli rapida konsulto?

Katalin Kováts: Nu, apartan vortaron ni certe ne eldonos, sed ni planas finaranĝi la terminojn, kiujn ni uzis en la dokumento kaj disponigi ĝin rete en edukado.net, laŭeble kun plurlingvaj tradukoj. Sed nun mia prioritato estas helpi la akreditigon de la ekzamenoj, konsili la grupon en Budapeŝto, kie tion oni preparas, kaj involviĝi en la “testadon de la testoj” de tiuj ekzamenoj.

Brazilei: Vi dediĉis al ILEI la rezulton de via laboro pri la Referenckadroprojekto. Per tiu deklaro vi pasigis la torĉon de tiu grava laboro al la teamo de ILEI. Ĝis nun la projekto estis subtenata de ESF kaj Fondaĵo

Saliko. Ĉu la subtenado daŭros kun la nova teamo aŭ ĝi ĉesis kun la fino de via laboro?

Katalin Kováts: Mi ĉiam klopodis resti ekster aŭ super de la financa parto. La subteno de ESF iris nur por la tradukisto, estis tia la interkonsento. El la mono de la Fondaĵo Saliko, kiun UEA mastrumis, oni financas plurajn administrajn kaj presejajn kostojn kaj la partoprenon de nia kolemino en la kunveno de la Konsilio de Eŭropo. Pri la cetero ILEI kaj UEA devos zorgi, sed mi scias, ke jam troviĝis plia subtenmono por financi la unuajn paŝojn de la akreditigo. Kion ni multe pli bezonas estas tempo kaj fakuloj pri la testfarado kaj ekzamenado, tiujn “faktojn” ofte malpli facilas trovi ol monon.

Brazilei: En la ranglisto de la membraro de *edukado.net*, Brazilo aperas en la dua loko kun 187 membroj. Malgraŭ tiu pozicio, brazilaj kontribuoj malmultas rilate al tiuj de aliaj landoj. Kiajn kontribuojn vi ŝatus ricevi de brazilanoj?

Katalin Kováts: La tri ĉampionoj en la aktiveco estas francoj, brazilanoj kaj hungaroj kun respektive 234, 187 kaj 108 membroj (la 24an de februaro 2008). Tiuj ciferoj devus speguli ankaŭ la forton de la landaj E-agadoj, ĉu ne? Se mi analizas la demandon el la vidpunkto de la kontribuoj al *edukado.net*, mi devas konstati, ke francoj kaj hungaroj konsistigas la kernon de la helpantaro. (Kaj tio estas ne pro tio, ke mi mem estas hungarino, kaj mia edzo franco.) Unuflanke en Hungario la situacio kaj graveco de E-instruado estas eksterordinara kaj nekomparebla kun tiuj en aliaj landoj. Aliflanke en Francio mi mem, en la lastaj 12 jaroj, gvidis multajn kursojn kaj seminariojn, havas centojn da persone konataj kaj instruataj amikoj, kaj tie agadas kaj propagandas ankaŭ Beatrice, mia “dekstra mano”.

Kun Brazilo ne kreiĝis ankoraŭ tiaj ligoj, kaj estas malfacile prezenti ankaŭ la vialandajn bonajn lernilojn, ĉar simple mankas mono en la familia kaso por aĉeti ilin. Donacoj, indikoj pri la plej valoraj kaj prezentindaj libroj certe riĉigus la paĝaran servon. Aliparte por ricevi pli da ekzercoj, leteroj kaj komunikoj de brazilaj samideanoj kaj kolegoj necesus, ke mi foje povu veni al via lando, rondvojaĝante gvidu kursojn kaj seminariojn kaj ankaŭ persone helpu al spertiĝo de brazilanoj. Tion mi volonte farus. Ĉu ni komencu traktadojn pri tio?

Nova Partnero

Kiel jam konate al multaj el vi, al niaj du partneroj, Imagu Filmoj kaj eldonejo Oportuno, de nun aldoniĝas unu plia, nome la porinstruista retejo www.edukado.net, kiun redaktas d-ino Katalin Kováts, filologo, lingvisto kaj plurmetoda lingvoinstruisto.

Tio montras al ni, ke, malgraŭ la malrapido de nia laboro, ni laŭiras la bonan vojon. Ni volas kundividi tiun feliĉan okazaĵon kun vi, kiuj decidis resti kun ni ankaŭ en 2008.

Iu povas demandi kio bona enestas en tiaj partnerecoj, krom eventuala rekono kaj apogo. La respondo povas esti same kuraĝiga: la eblo de interŝanĝado de fakaj kaj prilingvaj informoj. Alivorte, se ni aktive reagos al tiu interŝanĝo de spertoj, certe praktikaj rezultoj estiĝos; male, se ni pasive travivos tiun inviton, ni povos eventuale ĝui nur la moralan apogon.



Danke al tiu unua praktika kontakto, baldaŭ ĉiu membro de la Sekcio ricevos originalan ekzempleron de la resuma broŝuro "La Komuna

Interne



Eŭropa Referenckadro. Pri instruaj kaj taksaj metodoj por la akiro de modernaj lingvoj.”, kies diplomatian kaj organizan laboron plenumis d-ino Katalin mem.

Tiu regalaĵo nur estos ebla pro ŝia kuraĝiga interveno ĉe la Ĝenerala Direktoro de UEA, s-ro Osmo Buller, kiu afable donacos la bezonatan kvanton de la kajeroj. Ni estas kore dankemaj al ambaŭ, ĉefe al s-ro Osmo pro la agrabla surprizo.

Per tiu kajero-donaco ni celas inviti enlandajn kursgvidantojn ekdebuti la novajn lingvotestajn normojn proponatajn de la Konsilio de Eŭropo, cetere akceptitajn de UEA/ILEI por ties ekzamensistemo.

Ĝis la papera versio de la referenckadra kajero atingos vin, vi povas viziti la retejon www.edukado.net por konatiĝi kun la kompleta esperanta traduko de la verko “La Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado, pritaksado”, cetere jam mendebla ĉe la libroservo de UEA www.uea.org/katalogo.

Kun amikaj salutoj,
La provizora teamo

Bildstriaaj Herooj Ekinvadas Lernoĉambrojn



Joseo Tenorjo

2-a parto de la artikolo “*Valoro de bildliteraturo en lernoĉambro*” aperinta en la antaŭa numero de Brazilei.

Bildrakontoj pli kaj pli fariĝas preferata temo de kelkaj pedagogoj; de tempo al tempo gravaj enlandaj publikigaĵoj aperigas ion pri la temo. Kion aŭ kiun tiuj edukistoj celas per tiu invado de bildstriaaj herooj? Ili celas infanojn, ĉefe ilian alfabetigon, kies nunaj rezultoj, en Brazilo, estas motivo de tutlanda maltrankvilo ĉe koncernaj edukadaj instancoj. Infanoj iom malfrue atingas legokapablon.



Cele enkonduki infanojn en la deĉifradon de literoj, kelkaj instruistoj venigas armeon de bildstriaaj herooj por helpi ilin lude kaj plezure esplori tiun nekonatan mondon el vortoj kaj ideoj. Laŭ pritakso de la psikologo José Moysés Alves, en la artikolo “Mi jam scipovas legi bildrakonton” (revuo Nova Escola, 208/2007, p. 43): “La granda atuto [de bildrakonto] estas ĝiaj grafikaj rimedoj.

Bildoj aperas ligitaj al ĉiutagaj tekstoj, kaj permesas, ke la infano divenu kio okazos, kaj aldonu signifon al la rakonto eĉ se li/ŝi ankoraŭ ne scipovas legi". Per ekzerciĝo de tia bildo-rezonado, infanoj estas alfabetigataj laŭ plej ampleksa signifo, nome kompreno pri tio, kion oni legas.

Bildstriaĵ heroj parolas fremdlingve

Io simila okazas ĉe lernado de fremda lingvo. Post venki la alfabeton, lernantoj bezonas liberiĝi de aŭtomata teksta legado kaj iom post iom enkondukiĝi en praktikadon de kunteksta legado, ekz-e helpe de bildstriaĵoj, bildlibroj (ilustritaj infanlibroj) kaj bildrakontoj. Per instigado al legado de tiaj lerniloj, instruistoj invitas siajn lernantojn praktike ekuzi la lernatan lingvon. Malmultaj lernantoj legos ion plian ol sian lernolibron, sen iu instigo. Uzado de tia materialo en lernoĉambro, tamen, multe pli dependas de la personeco mem de la instruisto, ol de la konsisto de la lernantaro, ĉar por tiuj ĉi lastaj ne mankas publikigaĵoj laŭ iliaj ŝatoj kaj aĝoj.

Malgraŭ tio, ke enkonduko de bildrakonto en lernoĉambro prioritare ne celas paroligon de la lernantoj, oni povas adapti ĝin tiucele, kiel ni sugestos en la tria praktika parto de tiu ĉi artikolo. Cetere, kiel bone memorigas Dirk Bindmann, en la diskutlisto *Esperanto-I soc. culture.esperanto*: "Neni lernas paroli per legado aŭ rigardo de bildoj. Parolado lerneblas nur per parolado. Do, aŭ instruisto kreu paroligan situacion aŭ memlernanto konscie serĉu tian situacion, ekzemple dum vojaĝoj kaj renkontiĝoj".



La granda aventuro: trovi bildstriaajn rolantojn, kiuj parolas en Esperanto.

Ni multe fieras pri nia trezoro de originalaj kaj tradukitaj beletraĵoj, kies kiomo, laŭ kelkaj bravaj propagandistoj, superas 50 mil titolojn. Tio estas mirinda konkero — kialo de multaj esperantistiĝoj kaj agnosko de gravaj tutmondaj kulturaj instancoj. Sed internacia beletra lingvo bezonas eniri ankaŭ la sferon de ĉiutaga lingvouzo, despli ke la nombro de senpretendaj lingvouzantoj ĉiam estas pli granda ol tiu de celorientitaj lingvoĝuantoj.


Nia aventuro komenciĝas per serĉado de bildstrioj. Ili aperas tie kaj tie plej ofte en klubaj bultenoj (en kelkaj okazoj oni trovas eĉ ne pli ol unu registron de iu bildstrio). Trovi la esperantajn pionirojn de tiu Naŭa Arto ne estas facila tasko. Verŝajne la unua profesia bildrakontisto, kiu direktis sian krajonon al la esperantista medio, estas la franco Serge Sire, kiu plu kunlaboras per siaj desegnoj en kelkaj gazetoj, ĉefe en *La KancerKliniko* (mallonge, LKK), kie unuafoje aperis lia komiksulo Zorhof (1978), karikaturo de L.L. Zamenhof ludanta la maskitan *Zorro*. Cetere, li ankaŭ aŭtoras la *Kompendion pri blazonoj*, speco de manlibro pri heraldiko en formo de bildrakonto, eldonita de LKK, kio pruvas la efikon de desegnaĵoj por transdono de ajnaj scioj.



El la bulteno “*Kial Ne?*”, de la Junularo Esperantista Brita (JEB), venas la kunlaboraĵoj de Jano (Ian Carter?) per ties *SuperZam* ankaŭ en la 1980-aj jaroj. Alia komiksulo de tiu epoko estas Doktoro Senesperanto, de la kataluno Arnau Torras, kies kunlaboraĵoj premieris en la revuo *Kata Luno*, eldonita de Kataluna Esperanto-Junularo inter la jaroj 1985-1998.

Bildliteraturaj herooj parolas multajn lingvojn

Pluraj landoj kontribuas per tradukoj de nacilingvaj bildliteraturaĵoj, ĉefe de infanlibroj. Tre famaj estas la ĉinaj koloraj bildlibroj produktataj dum la pasintaj kvardek jaroj kaj ankoraŭ akireblaj ĉe multaj libroservoj. Malgraŭ la paso de la jaroj, la libroj plu allogas infanojn kaj plenaĝulojn. Novaj tradukoj de infanlibroj aperadas, ekz-e la bela kaj kortuŝa fabelo pri ama sinofero *La Bona Arbo*, de Shel Silverstein (Izvori, 1999). Aliflanke, kelkaj klasikaĵoj, kiel *La Eta Princo* de la franco Saint-Exupéry (unufoje tradukita al Esperanto komence de la 1960-aj jaroj) elĉerpiĝis, sed bonŝance ili plu restas disponeblaj en interreto.



Originalaj bildlibroj malmultas, sed ili ekzistas. Bona ekzemplo estas la plaĉa libro *La arbo... kiu forkuris* (Tokio, 1990) verkita de la usonano Martin Burkert por ĉiuajuloj. Ĉarma rakonto pri ekologio kaj la graveco de arboj por nia vivo.

Koncerne tradukojn de bildrakontoj, ni povas memori kelkajn klasikaĵojn kaj furoraĵojn:

La aventuroj de Tinĉjo, kreaĵo de la belga desegnisto Hergé pri juna ĵurnalisto, kiu travojaĝas la mondon kun sia hundo Miluo. La kolekto ampleksas 22 albumojn, el kiuj tri estis esperantigitaj: *La krabo kun oraj pinĉiloj* (1981), *La nigra insulo* (1987) kaj *Tinĉjo en Tibeto* (2005);

Asteriks, kreaĵo de la francoj René Goscinny (verkisto) kaj Albert Uderzo (desegnisto) pri rezisto de gaŭlaj vilaĝanoj al la altrudantaj romianoj. La serio, tradukita al dekoj da lingvoj, ampleksas 30 volumojn, el kiuj kvin estis esperantigitaj: *Asteriks la gaŭlo* (1979), *Asteriks, la gladiatoro*



(1994, *Asteriks kaj Kleopatra* (1995), *Asteriks kaj la normandoj* (1996) kaj *Asteriks ĉe la Olimpiaj Ludoj* (1996);

Cisko kaj Vinjo — la brusela bubo (2002) de la belgo Willy Vandersteen, pri la aventuroj de du petolaj flandraj geknaboj;

Nudpieda Gen (1985, 2-a reviziita eld.) de Nakazawa Keizi pri la teruraj travivaĵoj de la knabo Nakaoba Gen kaj lia patrino post la eksplodo de atombombo en Hiroŝimo en 1945.



Apartan registron ni dediĉas al la eldonprojekto de Hungara Esperanto-Asocio (HEA), kiu en la 1980-aj proponis eldonon de pluraj literaturaj verkoj, laŭ bildrakontoj, inter kiuj la klasikaĵo *La Faraono* (1980) de Boleslaw Prus (aŭtoro), T. Horváth (adapto) kaj A. Fazekas (desegnisto). Jen aliaj titoloj proponitaj de HEA: *La aventuroj de Tom Sawyer*, de Mark Twain; *Ivanhoe kaj Ben Hur*, de Walter Scott; *Robinson*, de Daniel Defoe; *Mizeruloj*, de Victor Hugo; *La tri muskedistoj*, de Alexandre Dumas; *La lasta mohikano*, de James F. Cooper; *La infanoj de kapitano Grant*, de Júlio Verne; *Pinocchio*, de Carlo Collodi; *La fantomoj de Canterville*, de Oscar Wilde, k.a.. HEA aŭdacis ne nur pro la eldonprojekto, kies bildrakontojn kunaŭtoris tiamaj elstaraj hungaraj grafikistoj, sed ĉefe pro la pedagogia klarvido “*Adaptaĵo de plej konataj kaj popularaj romanoj de la mondliteraturo aparte taŭgas por utiligo en la instruado de Esperanto, kaj por postkursa ekzerciĝo en la lingvo*”, laŭ reklamo aperinta en unu el tiuj bildrakontoj.



Pliaj du menciindaj pioniraj uzadoj de bildseria lernilo troveblas en la verkoj *Universala Esperanto-metodo*, de d-ro Benson (Usono, 1932), kaj *Kurso de Esperanto laŭ aŭdvida struktura metodo* de Antonie kaj Tibor Sekelj, eldonita de Internacia Esperanto Instituto en 1988. La ilustrita lernolibro de d-ro Benson enhavas ĉirkaŭ 11.000 desegnaĵojn kaj

estas trafe baptita kiel “rekta lega metodo”. Pri la fratoj Sekelj, komputile refasonita eldono de ilia ilustrita lernolibro aperis en 2002. Ĝi enhavas 864 desegnaĵojn (432 kolorajn kaj 432 nigra-blankajn) kaj estas akompanata de DVD kun la registritaj tekstoj. Por ke tiu bildlibro estu konsiderata aŭtenta bildrakonto, sufiĉus, ke ĝiaj aŭtoroj, anstataŭ aranĝi la tekstojn sub la desegnoj, enfermus ilin en parolvezikojn!



Enlanda kaŝejo de komiksuloj

Gazetara registro pri traduko de prestiĝa enlanda bildstrio eble estas nur tiu de Fernando Gonsales, *Nikelo Naŭzo*, parodio al la disneja ratulo Mickey Mouse. Ĝi aperis en kelkaj n-roj de la revuo *Brazila Esperantisto*, organo de Brazila Esperanto-Ligo, ekde la jaro 2004 (BE 328/jul). Inter la jaroj 2001 kaj 2005 talenta desegnisto kaj grafikisto kunigis al la redakta teamo de la revuo. Lia nomo estas Alison Simas, kiu aŭtoris, kunhelpe de Gacy Simas (tekstoj) kaj Josias F. Barbosa (traduko), originalajn kaj belajn bildstriojn en la rubriko BILDOJ (*Lian*, BE 315/jun2001, p.22; *Ana kaj Nokto*, BE 320/2002, p. 22 k.a.). Ankaŭ debutis en tiu revuo iu Luiz T. Silva per sia bildstrio nomata *Adamo* (BE 328/jul2004).

Elison Simas ne nur grafike refasonis tiun publikigaĵon, li ankaŭ ilustris la unuan revuon pri bildrakontoj *Logo*, eldonitan en Brazilo sub la ŝildo de la tiama avangarda eldonejo Zamenhof Editores. Temas pri kolekto da kvar bildrakontoj elpensitaj de Maria Sobral.

Alia enlanda revuo — *La Lampiro*, organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, registris en la jaro 2002, la partoprenon de la debutanto Flavio Rebelo, kiu tiam prezentis sian originalan bildstrio-serion *Zoo* pri la



Lian, de Alison Simas

Fernando Gonsales



komunuma vivo en bestoĝardeno. Entute estas 17 komiksuloj, ĉiu kun tre zorge difinita psikologia trajto: la aglo estas perfektema kaj korektema, la Krokodilo estas fuŝa kaj sintrudema, la anaso estas pretendema kaj ŝajnscianta, la bufo estas plendema kaj neniofaranta ktp.

Alia citinda historia originalaĵo estas la 13-paĝa foto-rakonto **Enuo** pri la sekreta malbono de artisto - tiuokaze pajaco - reĝisorata de Lima Cipolatti kaj ludata de la aktoroj Vitor Menezes kaj Álvaro Faŭsto. Mankas en la verko, eldonita

de Brazila Esperanto-Ligo partnere kun Kultura Kooperativo de la Esperantistoj, informoj pri eldonjaro.

Koncerne bildlibrojn, neforgesinda estas la traduko de la ilustrita rakonto *La knabo frenezeta* (1980), de la fama kartunisto Ziraldo Alves Pinto. La rakonton pri petolema knabo tradukis la tiama ankaŭ petolema Cristovão Resende. Alia registrindaĵo estas la du koloraj bildlibroj *Ruĝa Fiŝeto* kaj *Mallaborema Formiko*, ambaŭ eldonitaj de Legio de Bona Volo en 2007.

Novaj talentaj bildrakontistoj

De ĉirkaŭ du jaroj ia komiksa vento ree blovas vekante talentojn ĉe uzantoj kaj lernantoj de la lingvo. Iom konata al legantoj de Brazilo estas la komiksulo **Zaĉjo**, de Osmar da Silva Alves. Zaĉjo naskiĝis kiel ilustraĵo por librokovrilo. Komence li aspektis kiel plenaĝulo, sed poste la aŭtoro decidis junigi sian kreaĵon cele atingi ankaŭ la infanan publikon. La psikologia trajto de tiu rolanto ankoraŭ ne estas bone difinita. Mankas iu aventuro, por ke tio okazu. Ideoj multas. Malmultas ja tempo: la desegnisto laboras en tute malsama fako kaj tial nur de tempo al tempo li povas vekti sian komiksulon por regali nin per plia specimeno de sia arto.

Cecilia, kreaĵo de Ulysses Baldez, ankaŭ estas konata al la legantoj. Cecilia jam naskiĝis kiel petola knabino, kiu havas nevideblan amiki-





Oriinar

non, Sofia, kiu rolas kiel ŝia mentorino. Tuj poste naskiĝis ŝiaj gepatroj (tio eblas en bildrakonta mondo!), s-ro Pavel kaj s-ino Anja. La amikara rondo de la knabino, ne ĉesas kreski: la tuta rolularo nombras jam dek-du rolantojn. Pasintjare Cecilia konatiĝis kun interreto. Ŝi ŝategis la novaĵon

kaj tuj volis havi propran blogon por ricevi vizitojn de amikoj el la tuta mondo. Ŝi restis tiel ravita, ke ŝi forgesis ion: ŝi ankoraŭ ne bone regas Esperanton. Sed ŝia instruistino Helen jam promesis instrui ŝin bone paroli la lingvon. Cecilia petolas ne nur kun siaj amikoj, sed ankaŭ kun siaj legantoj: foje ŝi pensas, ke ŝi jam estas adoleskanto! Specimenon de tia petolaĵo vi povas vidi sur la kovrilo de tiu ĉi numero de Brazilo.

Plej nova talento-eltrovo estas Eder Benedetti, profesia grafikisto, kiu lernas la lingvon de kelkaj monatoj. Laŭ interkonsento, traduko de lia bildstrio-serio **Ed & Pris** de nun ankaŭ aperos en Brazilo. La du rolantoj estas universitatanoj. Ili serĉadas respondojn ne nur pri tio, kio okazas ĉirkaŭe, sed ĉefe pri tio, kio interne de ambaŭ pli kaj pli proksimigas unu de la alia. Ĉio ĉi aspektas kiel ordinara afero. Kaj fakte tiel estus, se tria rolanto, Nuno, ne aperus por helpi sian iom naivan kaj senpretendan amikon konkeri la simpatian de sia decidema kaj bonkora amikino.

Laste, sed ne balaste, ni prezentas plian bildstrion, kiu ankaŭ de nun aperos en Brazilo. Eble vi jam renkontis, ie en interreto, ĝian ĉefan rolanton, **Gogo la testudo**, de la germana bildrakonto-historiisto Martin Weichert, kies blogo viziteblas ĉe <http://gogo-la-testudo.blogspot.com>. Gogo kaj liaj amikoj estas originale esperanta bildstrio-serio pri la Esperanto-movado. Ĝi aperis en 1987, okaze de la jubilea jaro de Esperanto. En la strio-serio **Gogo la testudo** (maskotbesto de Germana Esperanto-Junularo, en kies gazeto aperis liaj unuopaj strioj) ĉefrolas kun siaj diversgeneraciaj kaj diverstipaj amikaj movadanoj.



Eder Benedetti

(Konsultofontoj pri tiu ĉi artikolo legeblas sur p. 25)

Trejnaranĝo

POR KURSGVIDANTOJ DE ESPERANTO

Esperantista Kunfratiĝo de la Okcidenta Regiono (mallonge EKOR), en Rio, invitas enlandajn kursgvidantojn ĉeesti sian 11-an Trejnadon por Kursgvidantoj de la Neŭtrala Internacia Lingvo. La ĉi-jara temo de la trejnarĝo estas “Planejamento de Aulas de Esperanto: Elaboraĉo e Aplikaĉo” (Lecionplanado: ellaboro kaj aplikado). La unu-taga evento okazos la 27-an de aprilo, de la 9-a ĝis la 17-a horo - en la sidejo de *Sindicato Rural*, ĉe Estrada do Monteiro, 643 - en la urbo Campo Grande, ŝtato Rio de Janeiro, sub la organizado de s-ino Nair Dragon, pedagoga respondeculo de la grupo. Aliĝo, kun tagmanĝo inkluzivita, kostas 15 realojn (pageblajn per depono aŭ ĉe-loke). Por pliaj informoj, sendu mesaĝon rekte al la organizantoj de la evento: ekor.esperanto@yahoo.com.br.

Laŭ s-ino Marilza Oliveira da Silva, unu el la direktoroj de EKOR, la celo de la unutaga trejnado por kursgvidantoj estas montri, per prelegoj, studrondoj kaj provlecionoj, kiel instrui Esperanton al infanoj kaj plenaĝuloj. La temo de la antaŭa trejnado, okazinta la 25-an de aprilo 2006, estis “Ensino do Esperanto pelo teatro. Como usar o teatro para ensinar a língua.” (Instruado de Esperanto per ŝkeĉludado. Kiel uzi teatroteknikon por instrui la lingvon.) Ĉirkaŭ kvindeko da instruantoj kaj instruemuloj ĉeestis la trejnadon, kiu kutime okazas parte esperante, parte portugale.

La ĉi-jara trejnado tamen, laŭ informo de Márcio Santos, unu el la membroj de EKOR, okazos nur portugale kaj konsistos el du prelegoj: unu pri psikologio (Aristides Pereira, psikologo kaj membro de EKOR) kaj alia pri Komunikado inter instruanto kaj lernanto (Paulo Carvalho,



nuna prezidanto de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro), kaj el du provlecionoj pri instruado por infanoj, sub la gvidado de Márcio Santos kaj Alcione Nunes, fine de kiuj la ĉeestantoj povos interagi per demandoj kaj komentoj. Krom ĉeesto-atesto, ĉiu partoprenanto ricevos lernokajeron, kun la tekstoj de la prelegoj kaj de la provleciono.

Koncerne tiun temon, Márcio sugestas proksimiĝon inter EKOR, BEL kaj ILEI-BR: “por ke ni povu plibonigi kaj valorigi tiun eventon, kaj aliajn, pri kiuj mi revas okazontaj en nia ŝtato”.

Gogo la testudo – Martin Weichert



Ed & Pris – Eder Benedetti



konsultfondo: <http://eo.wikipedia.org/wiki/Bildliteraturo>, www.cs.chalmers.se/~martinw/bildlit, <http://eo.wikipedia.org/wiki/Tinĉjo>, <http://www.uea.org>, <http://esperanto.be/fel>, <http://www.edukado.net>, retejo pri la brusela bubo: <http://suskeenwiske.ophetwww.net/>, <http://esperanto.net/martin.weichert/tinxjo.html>, <http://www.esperanto.net/martin.weichert/asteriks.html>, <http://www.novaescola.com.br>, Kolekto de Brazila Esperantisto (jaroj 2001 - 2005), Kolekto de La Lampiro (jaroj 2002 - 2003), retejo pri la brusela bubo: <http://suskeenwiske.ophetwww.net/>, <http://esperanto.net/martin.weichert/tinxjo.html>, <http://www.esperanto.net/martin.weichert/asteriks.html>

Claude Piron



(1931 - 2008)

Belgdevena svisa psikologo kaj psikoterapiisto. Tradukisto ĉe UN (1956–1961) kaj ĉe la Monda Organizo pri Sano (1961–1969). Aŭtoro de diversistema verkaro, inter kiu menciindas la furora lernolibro “Gerda Malaperis!” (1983), la elokventa esearo “La bona lingvo” (1989; 2-a eld. 1997), la populara serio de Ĉu-romanoj, sub la pseŭdonimo Johan Valano kaj la franclingva ĉefverko “La défi des langues” (La lingva defio, 1994), tradukita al aliaj lingvoj, inkluzive al la portugala. Honora membro de UEA (1998), laŭreato interalie de la Belartaj Konkursoj de UEA kaj de la premio Deguci (1994). Fervora pledanto por Esperanto kiel alternativo al la lingva kaoso ĉe internaciaj organizoj.

<http://claudepiron.free.fr/index.htm>

Gazetaj Komunikoj de UEA n-ro 280 (2008-01-24)

Lasu min funebri plu ⁽¹⁾

Claude Piron forpasis. La informo virtuale trakuras la januaran vesperon kaj haltas sur la ekrano de mia komputilo, senmova, senbrua, sensenca, atende al iu reago de la ricevinto. Ĉu iu ŝerco? Ĉu iu mistajpo por “forlasis la movadon”? Gravaj esperantistoj de tempo al tempo emas al tio. Tiuokaze, ne. Rapida rigardo al la sendinto de la mesaĝo konfirmas, ke la afero Onde ⁽²⁾ funebras de Rusio al la tuta mondo. Antaŭ tiu konstato, mi momente ne scias kion fari. Ĉu mi respondu la mesaĝon? Ĉu mi pasigu ĝin aliulen? Ĉu sole funebri, ĉu klube kunfunebri? Ĉu malĝoji, ke homo tia maloftas ĉe ni? Ĉu feliĉi, ke tia homo vivis ĉe ni? Ĉu pensi, ke li malaperis de sur la tero aŭ pensi, ke li revenos Tien?⁽³⁾ Ĉu kredi, ke li vivos trakosme⁽⁴⁾ aŭ kredi, ke li revenos surteren? Dume, ĉu plori orfe aŭ plu labori obstine? Ĉu lasi, ke liaj poresperantaj pledoj silentu aŭ pli laŭte ilin proklami, tiel ke li ne vane mortis?⁽⁵⁾ Ĉu baldaŭ la mondo parolos ĉine,⁽⁶⁾ aŭ antaŭe Esperanton kaptos Azio? Vere aŭ Fantazie,⁽⁷⁾ tio ja ne gravas. Gravas, ke per via vivekzemplo ni nutru nin por sufiĉe elteni la mokridojn de la homoj.

Dankon, amiko! (8)

Tenorjo



(2) Aludo al la rusa novaĵretejo *La Ondo de Esperanto*

KIEL TRAKTI LINGVOLERNANTOJN?

Inter amaso da verkoj de la tiel nomata “literaturo por memhelpo”, kiuj lastatempe ŝtopas la tutmondan libromerkaton, kaptis nian atenton du, kiuj temas pri edukado de infanoj, fare de gepatroj. La titoloj estas “Eduki kaj Laŭdi Knabinojn” kaj “Eduki kaj Laŭdi Knabojn”. La angla aŭtorino, Elizabeth Hartley-Brewer, estas fakulo pri infanedukado kaj kontribuas al famaj ĵurnaloj. Eble ŝiaj konsiloj estas foje evidentaj, sed fakto estas, ke multaj gepatroj ne sekvas ilin – kaj estas tre dezirinde tion fari. Jen ni prezentas dek ŝiajn rekomendojn, kiuj ŝajnas al ni tute saĝaj:

1. Montru, ke vi fieras pro la atingoj de viaj idoj. Ĉi tiu sinteno estas grava por ilia memestimo.
2. Laŭdu infanon. Sed prefere laŭdu la sintenon, kiu kondukis al sukceso (multaj horoj da studado), ne nur la rezulton (la bona poentaro ĉe ekzameno).
3. Atentu la infanon kaj ofte ĉeestu, por ke ĝi sentu sin amata kaj valorigata.
4. Helpu vian idon atingi celojn kaj helpu ĝin elvolvi kapablecojn.
5. Memoru, ke la aspiroj de la infano, ne la viaj, gravas por ĝia elvolviĝo. Ne projekciu viajn dezirojn sur idojn.
6. Kuraĝigu vian idon esti sociema, sed ankaŭ preni klaran sintenon fronte al konfliktaj situacioj.
7. Valorigu fantaziemon de infanoj, akceptu ties kreemon, eĉ malordon, sed ne maldisciplinon.
8. Rekompencu vian idon ne nur per donacoj, sed per gestoj aŭ rigardoj, kiuj montras amon.
9. Stimulu amikecon inter gefratoj.
10. Neniam sarkasmu al infanoj. Ili ne povas kompreni tiaspecan humuraĵon.

Ĉu eblas transmeti similan saĝon al lingvolernantoj? Eble ne estas tro fantazie supozoj, ke kiam homo komencas lerni lingvon, tiam li iamaniere fariĝas infaneca – eĉ se li estas plenkreskulo. Li devas lerni novajn sonojn, balbuti, ekuzi simplajn frazkonstruojn, barakti meze de nekonataj vortoj kaj lingvostrukturoj. Pruvo pri tia infaneco estas la milda estimo, kiun lingvolernanto konservas pri sia instruisto, simile al tiu, kiun ni ĉiuj konservas pri la unua instruisto, kiu nin alfabetigis.

Se tio estas vera, do eble ni devus klopodi adapti la konsilojn de Elizabeth Hartley-Brewer al niaj lingvolernantoj. Jen kelkaj proponoj:

1. Montru, ke vi fieras pro la progresado de viaj gelernantoj. Ankaŭ por ili memestimo gravas.
2. Laŭdu viajn gelernantojn. Ne nur pro la poentoj ĉe ekzamenoj, sed ĉefe pro ilia klopodado.
3. Klopodu montri individuan atenton al ĉiu aparta lernanto. Ĉiu lernanto prezentas apartajn lernomanieron.
4. Helpu ĉiun apartan lernanton atingi sian celon, evitante komparojn kun kolegoj.
5. Memoru, ke gelernantoj ne havas la saman senton pri la lingvo lernata, kiel vi mem. Ne projekciu vian idealismon sur ilin senrezerve.
6. Kuraĝigu vian lernanton esti sociema en la klaso kaj eĉ ekster ĝi, sed permesu, ke ne ĉiuj volu partopreni en viaj “amuzajoj”. Atentu pri la ŝercoj en la klaso – eble ili ne plaĉas al ĉiuj.
7. Valorigu improvizaĵojn fare de viaj gelernantoj, eĉ foje iom da malordo en la klaso, sed neniam ĉesu insisti, ke lingvolernado postulas disciplinon.
8. Rekompencu viajn gelernantojn ne nur per belaj poentoj post ekzamenoj aŭ post hejmaj taskoj, sed ĉefe per via sincera amikeco.
9. Stimulu kamaradecon kaj kunlaboron inter viaj gelernantoj.
10. Neniam sarkasmu aŭ senpaciencaĝu antaŭ viaj gelernantoj. Eĉ se vi estas bonega instruisto, eble ili forlasos la kurson, se ili sentis sin persone atingitaj.

Ĉu vi mem, laŭ viaj instruistaj spertoj, povas proponi pliajn konsilojn? Do, sendu ilin al BRAZILEI!

EU FINANCOS PERESPERANTAN TRADUKPROJEKTON DE INFANLIBROJ

La Eŭropa Komisiono aprobis tradukprojekton de infanlibroj, en kiu Esperanto rolas kiel pontolingvo. EU financos per 64 000 eŭroj la projekton, en kiu infanlibroj pere de Esperanto estos tradukitaj inter la bengala, itala, slovena kaj kroata lingvoj, kaj poste distribuitaj en elementaj lernejoj.

La eldonprojekto, kiun ellaboris por Kroata Esperanto-Ligo Zlatko Tišljar, kaj en kiu partoprenos kiel partneroj Edistudio, el Pisa (Italio), Inter-kulturo, el Maribor (Slovenio), kaj barata eldonasocio Samatat Siksha – Samatat Prakashan el Kalkato estis aprobata de kulturfunduso de Eŭropa Komisiono (EACEA – Culture).

La projekto antaŭvidas, ke ĉiuj partneroj (itala, slovena, kroata kaj barata) tradukos el siaj lingvoj unu infanlibron de sia literaturo al Esperanto. Poste la barata partnero plutradukos la tri eŭropajn librojn el Esperanto en la bengalan, kaj la tri eŭropaj partneroj tradukos la baratan libron ĉiu al sia nacia lingvo.

Post kiam la librojn, oni en elementaj urboj kaj organizos inter la infanoj. La de la infanoj pri libro al alikontinenta kulturo la tuto la eldonistoj daŭre kaj televidon.



ĉiuj eldonos distribuos ilin lernejoj de siaj legokonkurson plej bonaj verkoj legita kaj apartenanta estos premiitaj. Pri informados la gazetaron, radion


La barata partnero kunlaboras kun la prezidanto de UEA, Probal Dasgupta. La projekto estos efektivigata inter majo 2008 kaj majo 2010. Tiu estas la unua tiaspeca interkultura projekto uzanta Esperanton, kiun finance subtenas Eŭropa Komisiono.

Raportis Zlatko Tišljar

Fonto: <http://www.liberafolio.org/2008/eubaratalibro>

Enlanda furora lernilo

Ĝus aperis la 9-a eldono de la lernolibro Esperanto para Principiantes (Esperanto por Komencantoj), de la advokato kaj instruisto Aloísio Sartorato, el Rio. La lernolibro, eldonata de Brazila Esperanto-Ligo, jam superis la rodan ciferon de 10 mil ekzempleroj venditaj. Laŭ la aŭtoro, la libro unufoje aperis en 1986 per multobligajoj. Kvin jarojn poste li mem pagis presitan eldonon, kio multe helpis popularigi la verkon. De tiam pli kaj pli da instruistoj ekuzas ĝin en la tuta Brazilo. La verko mendebblas ĉe jenaj retejoj: www.esperanto.org.br, www.kke.org.br.



BEL serĉe al novaj talentoj

Belartaj Konkursoj de UEA ĉiujare premias konkursantojn laŭ diversaj branĉoj. Unu el tiuj branĉoj, nome tradukaĵoj, de nun ne plu akcepteblas. Instigata de UEA-sugesto, ke la landaj asocioj starigu konkurson pri tradukaĵoj, la estraro de Brazila Esperanto-Ligo decidis lanĉi Beletrajn Konkursojn de BEL, kiu konsistas el du branĉoj: tradukita prozo kaj tradukita poezio. La ĉi-jaraj du selektitaj tekstoj estas rakonto de Machado de Assis kaj poemo de Raul de Leoni. La tekstoj kaj la regularo elŝuteblas el la retejo de la Ligo ĉe la adreso <http://esperanto.org.br/p/content/view/246/108/>.

Nova podkasto

Nova ondo de Esperanto rete elsendiĝas al la tuta mondo ekde la 5-a de februaro 2008. Temas pri la ret-radia servo de la rusa novaĵretejo "La Ondo de Esperanto", kiu prezentas elektitajn tekstojn el sia retejo laŭ podkasta formato. La podkastajn epizodojn prezentas Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov kaj Andrej Peĉonkin. Vizitu mem la podkastejon ĉe <http://la-ondo.rpod.ru> kaj, trovinte la sonvinjeton, musklaku ĝin por aŭskulti la epizodojn, kiuj ankaŭ aboneblas (per "iTunes" aŭ simila programo) ĉe <http://la-ondo.rpod.ru/rss.xml>.

PLATONA AMO — Eternaj komencantoj

José Dias Pinto

La platona amo de renesancaj poetoj, tiu etera kaj eterne senplenumiĝa amo, surmetis aliajn vestojn. Unu el ili estas virtuala, sed ĉi tiu, male de la poeta, foje elretiĝas kaj aliaranĝiĝas, iniciate de ambaŭ aŭ nur unu el la partneroj. Eventuale ili sukcesas materiigi la subliman eterecon per la konkreta fizika kontakto. Povas el tio io frukti – frustriĝoj aŭ io alia, iam eĉ familia burĝono.

Alian pli puran ekzemplon de platona amo prezentas niaj eternaj komencantoj. Kiel la renesancaj poetoj, ankaŭ ili sente kaj sentimentale prikantas la superajn kvalitojn de la objekto de sia amo. Tiu amo, kiu mirakle nutriĝas el la sama etero, kiu tenas viva la amon de la poetoj. Naive sincere ili parolas pri la rigora reguleco de la lingvo, pri la senesceptaj malmultaj gramatikaj reguloj, pri la logika kaj konsekvenca strukturo, pri la senfina vortriĉo, kiun paradas la vasta esperanta literaturo. Konvinkite kaj konvinkoprove ili parolas pri tio, ke ĉion ĉi atingis lingvo genie simpla.

Kompreneble ili parolas ankaŭ, kaj ĉi-kaze iom pli kohere – tenu sin tajloro ĉe sia laboro – pri la sublimeco de Esperantismo kaj la potenciala forto de Esperanto. Pri idealismo ili rajtas ja paroli, ĉar ili estas admirinda ekzemplo de vivipova ŝvebanta tia sento.

Bedaŭrinde, por la Movado kaj por ili. La Movado perdas potencialajn kunportantojn de la realaj valoroj de Esperanto, kaj ili perdas la eblon senti sin iom pli mondĉivitanoj, uzi Esperan-

ton kiel kulturinstrumenton kaj katalizilon helpan al la ellerno de sia propra lingvo, kaj eĉ kiel faciligilon por la lernado de aliaj lingvoj. Ĝia relativa facileco permesas ja, ke en multe malpli da tempo ol tiu necesa por nur baze asimili nacian lingvon, oni povu senti ĝin kiel sian. Kaj, kompreneble, se oni posedas du lingvojn, la vojo al tria estas pli oportune irebla. Bedaŭrinde, ke ili kontentiĝas per tiu demalproksima adorado, anstataŭ provi intimiĝi kun la lingvo, iĝi amantoj kaj amorantoj de ĝia literaturo, tiel stimule kontribuante al la heroa laboro de niaj verkistoj kaj eldonistoj.



Se niaj eternaj komencantoj decidus transpasi la Rubikonon — ĉi-foje pace kaj pacige — apartigantan la platonan, revatan amon disde la konkreta posedo de la lingvo, la realan ĝuon de ĝia literaturo, la facilecon parole egalnivele kaj sendiskriminacie komuniĝi kun alilingvanoj, certe ili ne bedaŭrus, ke ne estas superrubikonaj pontoj por la reveno al la antaŭrubikona situacio. Certe ili sentus sin memfide komforte por ankoraŭ pli laŭtsonne disheroldi la kvalitojn de iu lingvo, kiun ili mem posedas kaj kiun do ili povas persvade – ĉar ili havas la grandan argumenton de la propra ekzemplo – sugesti al aliaj, kiel indan studobjekton.

Oni devas tamen rekoni, ke la rivero ne estas mallarĝa kaj ankaŭ, ke malsamgradas la kapabloj tranaĝi ĝin. Povas okazi, ke iuj devas flose ripozi survoje, aŭ antaŭeniri pli malrapide, aŭ ambaŭ, sed en tiu surrivera tasko oni ne riskas droni. Eble frustriĝi pro la konstato, ke oni ne estas porlingve talentaj. Tio ne estas vivdetrua. Oni povas esti pli malavare dotitaj por aliaj aferoj, artaj, teknikaj, kulturaj, sociaj, politikaj. Sed oni konsideru ankaŭ, ke taskoplenumado povas esti per si mem same plezurdona – aŭ pli – kiel la plenumfina atingo de la celo. Taskoj, ankaŭ la mensaj, igas nin senti nin vivaj, kaj provizas al ni memfidon, tiel necesan por pli plene ĝui la vivon kaj la eblojn, kiujn ĝi proponas.

Oni ne estos escepto, se oni rezignos antaŭ la atingo de la alia margeno. Estas multe da rezignintoj, kiuj ne sukcesis elteni la trairon. Sed estas malmulte da rezignintaj trairintoj. Iu fama esperantisto faris tion en la apogeo de sia esperantisteco kaj, ĝuste pro la rareco de la fenomeno, lia nomo heredigis al ni la verbon “kabei”. Iuj atribuas al li la kvazaŭ pravigan frazon “unue la esperantistoj lernu Esperanton”, per tio sugestante, ke niaj dumvivaj komencantoj portas almenaŭ parton el la kulpo. Oni rezignas antaŭ aŭ dum la rubikona trauro; eventuale, sed ege malofte, oni kabeas poste. Probable oni tenas sian “realan” intereson por Esperanto, ĉar tiam oni sentas sin konkeritaj de la atributoj propagandataj de niaj tiel nomataj eternaj komencantoj -- se oni povis preteratenti, ke ili mem ne ĝuas la ofertatan varon.

*Baldaŭ akirebla
en la retbutiko
de la Sekcio.*



Ges-roj Blanke intervjuiĝas ĉe TV Supren



D-ino Wera kaj Prof. Detlev intervjuataj de prof. Paulo Nascentes (dekstre).
Fotoj ĝentile senditaj de la intervjuito.

La germana lingvisto Detlev Blanke, fakulo pri Esperantologio kaj Interlingvistiko, kaj lia edzino Wera Blanke, kiu fakas pri terminologio, vizitis la sidejon de Unio Planeda kaj TV Supren hieraŭ (la 19-an de januaro 2008) kune kun s-ino Ursula Grattapaglia, direktorino de Lernejo-Bieno Bona

Espero (Alto Paraíso/GO).

La ĝenerala temo de lia intervjuo en nia televida studio (Lago Norte/Brasilia) estis “La signifo de scienco por la progresigo de Esperanto”. Interalie li klarigis pri diferencoj inter Esperantologio kaj Interlingvistiko, Lingvistoj pri E-o, Lingvopolitikaj kaj lingvofilozofiaj aspektoj (artefariteco kaj lingvoplanado), Lingvo-politiko, Kial Esperanto (mal)sukcesis.

Wera parolis pri temo ofte neglektata, la faka apliko de Esperanto, aparte pri fakvortoj, la terminoj. Laŭ kiuj principoj oni faru fakvortojn?

Informis: Paulo Nascentes

Esperanta Nukleo de Unio Planeda/TV Supren

www.uniaoplanetaria.org.br/www.tvsupren.com.br

www.lernu.net

lernu

Lernado daŭras

Odilia Milhomens

Mi gvidis kurson por infana grupeto, de aŭgusto ĝis decembro 2007, unufoje semajne. La grupo konsistis el 9 infanoj, 10-12 jaraĝaj. Ili partoprenas en sociala programo organizata de spiritisma institucio “Lar Fabiano de Cristo”, en la urbo Beleno, ŝtato Parao, kaj frekventas malsamajn klasojn – de la 2-a ĝis la 4-a – de la fundamenta (aŭ unuagrada) publika lerno-sistemo.



Dum tiu esperanta kurso, mi provis apliki kelkajn teknikojn el la Cseh-metodo, vigligi la lernadon per kantado, prezentado de etaj teatraĵoj marionetaj kaj per interparolado.

aliajn lernejn

La ĉefacelo la memfidon etulinaj pere de

tio tutcerte okazis. Jen pruvo de instigo al onta simila agado: Esperanto estis diskonigata en la koridoro, okaze de la tagmanĝopaŭzo, al pli junaj samlernejanaj de aliaj klasĉambroj. Tial, iu venis al mi kaj diris: “Onklinu, ankaŭ mi volas lerni Esperanton!” Do, mi decidis daŭrigi instruadon en 2008.”



Ses infanoj restis ĝis la fino de la kurso. Tri forlasis ĝin, ĉar ili devis ĉeesti, vendrede, aferojn.

de nia provo estis fortigi de ĉiuj ĉi etuloj kaj Esperanto. Mi kredas, ke

Odilia Milhomens havas universitatan diplomon pri la portugala lingvo kaj literaturo. De multaj jaroj ŝi ofice laboras kiel organizanto de ekspozicioj kaj foiroj pri manartaĵoj en ŝtata sekretariejo. Pasintjare ŝi revenis al la lernoĉambro.

lam, Monteiro Lobato, fama brazila verkisto, asertis: "Landon oni konstruas per homoj kaj libroj". Imitante Monteiro Lobato, ni ankaŭ povas diri, ke: "Movadon oni konstruas per homoj kaj libroj".

Konscia pri la ankoraŭa graveco de la libro en la nuntempa mondo, Kultura Kooperativo de Esperantistoj (KKE), el Rio de Janeiro, Brazilo, decidis lanĉi, okaze de sia kvindekjariĝo, en julio 2001, la kampanjon "Esperanto en la Bibliotekojn", kies ĉefa celo estas provizi, precipe publikajn bibliotekojn, per libroj en aŭ pri Esperanto.

Tiucele jam estis ekspeditaj al 51 enlandaj kaj 10 alilandaj bibliotekoj (en Paragvajo, Mozambiko, Rusio, Dominika Respubliko, Togolando, Argentino, Portugalio, Kubo kaj Irano) pli ol 600 libroj (ĉefe lernolibroj kaj vortaroj, sed ankaŭ literaturaĵoj!). Tial dekoj da urbaj bibliotekoj en pluraj brazilaj ŝtatoj ricevis donacon de la kampanjo. Krome oni sendis specialan pakaĵon, entenantan verkojn de la brazila literaturo tradukitajn en Esperanton al "Biblioteca Nacional" kaj al "Biblioteca da Academia Brasileira de Letras".

Per enlandaj donacoj ni disvastigas E-on inter neesperantistoj brazilaj. Per alilandaj donacoj ni helpas lokajn movadojn ankoraŭ ne tre fortajn. La kampanjo estas komplete subtenata de libervolaj mondonacoj de deko da brazilaj samideanoj. KKE zorgas pri la ekspedo kaj administra laboro de la kampanjo.

Ĉe finpretigo de tiu ĉi n-ro de Brazilo, ni eksciis pri la sendo de la 62-a libropakaĵo, ekspedita al la biblioteko de Brazila Beletra Akademio, en Rio. La novaĵo en tiu ekspedaĵo estas la novaj verkoj (*La Luzidoj*, de Camões; *La Alienisto*, de Machado de Assis; *La Supeo de la Kardinaloj*, de Júlio Dantas; *La Balado de Prizono Reding*, de Oscar Wilde; *Vivo Nova*, de Dante Alighieri kaj *La Infana Raso*, de William Auld) plurekzemplere akiritaj ĉe eldonejo Fonto de José Dias Pinto, kiu ilin donacis al la kampanjo "Esperanto en la Bibliotekojn". Aliaj du verkoj konsistigis la libropakaĵon: *La Alkemiisto*, de Paulo Coelho, kaj *Poesias Escolhidas do Brazila Esperanta Parnaso*, de Sylla Chaves kaj Neide Barros Rêgo, donacoj respektive de la tradukinto kaj de la kompilintoj. (NdIR)

Venis nova sento

“BEL-konferencoj estas nova iniciato en la brazila movado, cele al plia flegado de niaj kulturaj valoroj, ĝenerala kleriĝo kaj stimulado al amika kaj riĉiga kunvivado.”

Paulo Sergio Viana,
organizinto de la evento



Teksto: Joseo Tenorjo

Desegnaĵoj: Osmar da Silva Alves

Ĉirkaŭ kvindeko da esperantistoj el pluraj brazilaj urboj rezignis pri la gajo de karnavalo kaj veturis al la ĉarma urbo Lorena, en la ŝtato San-Paŭlo, cele partopreni en la dutaga evento *BEL-konferencoj 2008*. La prelegoj okazis en la Kulturdomo de Lorena kun tre vigla partopreno de la ĉeestantoj, kiuj fine de ĉiu prelego povis interagi per demandoj kaj komentoj. La evento estas iniciato de Brazila Esperanto-Ligo kaj ĝin organizis ties vicprezidanto, d-ro Paulo Sergio Viana, el la gasturbo de la evento.

F. Wechsler



J. Passini



A. Sartorato



Sylla Chaves



Alóisio Sartorato — aŭtoro de la populara lernilo “Esperanto para Principiantes” kaj unu el la prelegintoj —, demandite pri la evento, diris: “Mi timis, ke, pro la dato-elekto, venos malmultaj homoj. Feliĉe mi malpravis kaj la organizinto pravis”. Sartorato prezentis interesan temon, nome “Brazilaj intelektuloj kaj Esperanto”. Kun granda miro multaj ĉeestantoj povis ekscii, ke unu el niaj plej eminentaj brazilanoj, la verkisto Guimarães Rosa, ne nur simpatiis al Esperanto, sed mem rapide lernis la lingvon kaj eĉ iom movadumis. Koncerne la temon de sia prelego, Sartorato konfidis: “Mi ŝatas esplori pri famaj homoj, kies opinio iel ligiĝas al Esperanto. Opinioj de tiaj homoj estas bone takeblaj de la ceteraj homoj en la socio. Se ili pozitive prezentas Esperanton, tio povas malfermi al ni pordojn.”

Siaflanke, Prof. Sylla Chaves, kies prelego temis pri oportunaj Esperanto-vortaroj, tiel komentis pri la evento: “Bonega. Bonega pro tio, ke mi ne atendis tiom multe da homoj kaj tiel multe da intereso. Malgraŭ ke mi jam konis la prelegantojn, mi sciis, ke la temoj estos interesaj kaj variaj”. Prof. Sylla parolis pri siaj nunaj privortaraj okupoj kaj ĉefe pri la esperantigo de brazilaj lingvoj, kiujn li konsideras nepre registrindaj en siaj baldaŭaj aperontaj vortaroj. Malgraŭ la amplekseco de la temo, prof. Sylla disponis je malpli ol unu horo por prezenti sian prelegon. Demandite ĉu homoj povos iel kunlabori kun lia nunaj privortaraj projektoj, li diris: “Ili certe povos, ĉar ili scias pli-malpli kiu tipo de vortoj interesas min. Mi insistas, ke unu persono devas decidi, ne kun komisiono. Do mi decidis. Tamen, ju pli da aferoj venos, des pli da materialo mi havos por decidi. Kaj mi certe dankegos la kunlaboron.”

J. Piton



Florianio P.



P. Viana



G. Mattos



Alia interesa prelego estis tiu de Prof. Francisco Stefano Wechsler — estrarano de Brazila Esperanto-Ligo kaj redaktoro de ties oficiala organo, Brazila Esperantisto —, kiu invitis la ĉeestantojn rendevui kun la portugala poeto Fernando Pessoa. La multpersonecoj de la poeto, kunligitaj al kelkaj personaj vivotragedioj, estis lerte prezentataj de la preleganto, kiu estas ne nur admiranto de la monde konata poeto, sed ankaŭ provtradukanto de kelkaj liaj poemoj.

Krom Aloísio Sartorato, Prof. Sylla Chaves kaj Prof. Francisco Wechsler, ankaŭ prelegis: Prof. José Passini, lingvisto kaj nuna prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo (Lingvaj Rajtoj); Inĝ. Floriano Pessoa, membro de la Ekzamena komisiono de Brazila Esperanto-Ligo (Perfektigo per tradukado-komparado); Prof. Geraldo Mattos, lingvisto, membro de la Akademio de Esperanto kaj ties prezidanto — 1998-2007 (Akademio de Esperanto). Ne povis ĉeesti la eventon la komitatano de Universala Esperanto-Asocio, James Rezende Piton, kies prelego-temo, tamen, estis forume prezentata al la publiko sub gvido de la vicprezidanto de BEL, Paulo Sergio Viana.

Demandite pri la nova E-aranĝo, la organizinto de la evento respondis: “Kelkaj homoj ne tre konsentas pri la nomo ‘konferenco’, ĉar ĝi estas tro solena. Tamen mi garantias al vi, ke ĉi tiuj prelegoj estas pli ol prelegoj. Mi kredas, ke la publiko multe lernis de ĝi kaj mi pensas, ke oni sukcese trafis la celon de tiuj konferencoj.” Laste, li dankis kaj faris inviton: “Mi dankas la ĉeeston de multaj homoj kaj petas, ke vi sendu mesaĝon de gratuloj al la kulturdomo de Lorena <culturalorena@uol.com.br>, ĉar ĝi donas grandan apogon al la loka E-movado kaj al la evento *BEL-konferencoj*.”



Ŝajne la bunteco de la prelego-temoj estis la spico de la sukceso de la evento.

Roberto Fausto, kiu venis el la urbo Belo Horizonte, ŝtato Minas Gerais, por ĉeesti la dutagan eventon, havis agrablan surprizon: “Mi estas surprizita, ĉar kiam mi vidis la nomon ‘konferencoj’, mi pensis pri kunvenoj, pri administraj, burokratecaj aferoj de la movado. Tamen kiam mi venis en la renkontiĝon kaj vidis, ke ĝia celo estas kultura kaj altnivela aranĝo, mi tre ŝatis.”

Ankaŭ Mario José de Menezes, vickonsulo de Brazilo en Japanio, bone taksis la eventon: “Estas granda plezuro partopreni en tia renkontiĝo. Mi libertempas en Brazilo (...). En Japanio mi legis en interreto pri la afero kaj mi diris: bone, mi devas partopreni tiun renkontiĝon en Lorena. Estas granda plezuro renkonti grandajn eminentulojn de Esperanto tie ĉi.”

Brazila Esperanto-Ligo kaj eldonejo Oportuno, unu el la partneroj de la Brazila Sekcio de ILEI, disdonis senpage al la konferencanoj kajeron kun la prelego-tekstoj. Laŭ interkonsento kun la organizinto de la evento, la Sekcio akiris la rajton regali siajn membrojn per pdf-versio de la prelego-kajero, por ke ankaŭ tiuj, kiuj ne povis vojaĝi al Lorena, profitu el la laŭdinda iniciato. Rezulto de tiu permeso estas la bildomesaĝo kun la karikaturaj de ĉiuj prelegintoj ĉarme desegnitaj de la talentulo Osmar da Silva Alves, el la urbo San-Paŭlo. La bildomesaĝo kun pluraj elŝutebloj, inkluzive de la prelego-kajero kaj fotoj, viziteblas en la retejo de la Sekcio ĉe la adreso <<http://www.ileibr.org/kuriero/konferenco/konferenco.html>>.



Instrui al tria-aĝuloj

Adriana Pavani



Instrui per interreto jam estas defio. Ni devas transpasi multajn barojn kiel, ekzemple, la malfacilecon de la lernantaro uzi la programojn por la lernado, la mankon de aliro al interreto kaj eĉ la mankon de bonaj aparatoj.

Sed, kurioza fakto atentigas nin: homoj, kiuj estas en la plej matura aĝo, aŭ proksime al ĝi, multe interesiĝas pri la kurso kaj serioze studas ĝin.

Dum nia laboro per interreto, ni rimarkis, ke la plej granda parto el la reta lernantaro, kiu aliĝis al nia persona servo, konsistis el homoj, kiuj estis aŭ preskaŭ aŭ pli aĝaj ol sesdek jaroj. Do, ni faris kelkajn esplorojn por kompreni la kialon de tiu fakto:

1 - Ĉe homo pli matura, kiam intereso pri io estiĝas, tiu intereso estas vera. Li jam multe vivis kaj spertis, kio ebligas, al li serĉi aferojn, kiuj vere donos plezuron lerni.

2 - La sperto de la vivo jam donas al tiuj homoj kondiĉojn por bone kompreni la sencon de la aferoj elektitaj. Tiel la emo lerni Esperanton estas plibone komprenata al homoj pli aĝaj, ol al adoleskantoj, kiuj ankoraŭ komencas sperti aferojn novajn kaj tial ankoraŭ ne havas kondiĉojn elekti konvinke siajn vojojn. Ni rimarkis, ke multaj adoleskantoj venas al la kurso kaj tuj forlasas ĝin, aŭ pro perdo de intereso aŭ pro neceso studi aliajn aferojn por eniri en la universitaton.

3 - Homoj pli aĝaj havas pli da trankvileco por sin dediĉi al lernado, kaj kelkaj eĉ havas iom pli da tempo, ĉar multaj jam estas emeritaj. Do, ilia libertempo estas pli granda ol tiu de junuloj, kiuj havas aliajn zorgojn, kiujn la plej aĝaj ne plu havas...

4 - Ili havas pli da atento al multaj detaloj en la kurso, kvankam multaj el ili plendas pri memorkonfuzo, kies origino estas en la aĝo kaj en la bataloj de la vivo. Ni rimarkis, ke iliaj malfacilecoj estas perfekte

(Daŭrigota sur p. 45)

Komentoj: *Paulo Sérgio Viana*

Antaŭ teksto ne tro malfacila (kvankam subtilaj faliloj troviĝas, ja), mi rimarkas, ke la tradukintoj suferis la oftajn problemojn: troa inklinio imiti la parolturnojn de la originalo, anstataŭ serĉi Esperantajn parolturnojn, kaj... forgeso konsulti la vortaron! Koncerne la unuan malfacilaĵon, la stumbloj estas pli pardonindaj, ĉar oni solvas tion nur per longa, daŭra, senĉesa legado de bonaj aŭtoroj. Sed rilate la duan... foje la afero randas neglekton (se vi pardonas min pro ĉi tiu vorto). Mi menciuj ekzemplojn: ĉu uzi “miksturo” por “mistura de júbilo e medo”?! Ĉu “uno foje”? Ĉu “elkore agitigita”?! Ĉu “inspiris” anstataŭ “enspiris”? Ĉu “konvike”? Ĉu “konvikte”?

Alia problemoj estas la malnova akuzativo. Ĉu problemoj aŭ simple manko de atento? Vidu: “ne sentiĝis ventoblovon”! Alia ekzemplo: “de supre ĝis malsupren”. Unu tradukanto ripete uzis “kiu” anstataŭ “ke” (kaj eĉ ĉi tiu “ke” ne bone taŭgus, stile). Alia skribis: “kreskitaj okuloj”.

Inter la traduko-proponoj, tiu numero kvin tamen tre plaĉis al mi, ĉar la aŭtoro prezentis elegantan, nature Esperantan tradukon, kiu sonas originale, do bonege. Mi taksus ĝin perfekta, tamen... li dormetis, kiam li tradukis “sentou na rede” per “sentis en la hamako”! Ĉar evidente temas pri malatento, mi elektas la kvinan kiel la plej bonan.

Kaj al ĉiu samideano, ĉefe al tiuj, kiuj amas tradukadon, mi proponas ekzercon koncerne la akuzativon. Tralegu la tutan Biblion en Esperanto, kaj substreku ĉiun akuzativon, kaj atente analizu la frazon. Poste, respondu: se mi estus la tradukanto, ĉu mi same uzus la defian “-n”? Kaj kiam vi finos la studadon de ĉiuj akuzativoj de la Biblio, tiam prenu la “Fabelojn de Andersen”... kaj poste... kaj poste...”

(Daŭrigota sur la sekva paĝo)

Rimarko: la traduko-komentanto ne scias, kiu sendis kion, ĉar al li ni sendas la tradukaĵojn markitaj per numero (traduko 1, traduko 2...) anstataŭ per la nomo de la sendintoj.

Premiita tradukaĵo:

Ja tiutage, vesperiĝe, kun la silento ĉirkaŭ si, venis al li la stranga impresoj ke Vanĵu' troviĝas tie en la malliberejo. Li vidis la tremadon de la lampflamo, kvazaŭ ĝi estus estingiĝonta. Li rigardis ĉirkaŭ si konfuzita. Li ne sentis la ventan blovon. Neatendite ŝajnis al li, ke li rekonas la odoron de la Vanĵu-korpo disemita en la aero. Li larĝigis la naztruojn, per pli profunda enspiro. Li ree ĉirkaŭrigardis, ankoraŭ pli konfuzita. La fortan odoron de akvumita florplena gardenkesto, kiun ŝi dispelis ĉirkaŭ si je la baneliro, li eksentis nun, pura, penetropova. Ĉu ĝi venis el ekstero, kune kun iu venta fortblovo? Kaj kial li ne sentis ĝin dum la aliaj vesperoj? Plian fojon, li vidis la flamon tremanta en la vitrumo, kvazaŭ iu ĝin alblovus de supre malsupren. Hirtiga ekstremo traglitis lian spinon. Tio ja estas ŝi, jes — li konkludis, kun la koro forte batanta, mikso de ĝojo kaj timo en la ekbrilo de la ege malfermitaj okuloj. Li sidiĝis en la hamakon, ekfermis la palpebrojn. Kaj per mallaŭta voĉtono, konvinkite, ekparolis al ŝi:

— Mi scias Vanĵu, ke vi troviĝas apud mi. Mi ne vidas vin, sed mi vin sentas. Tiuodoro estas via. Mi tuj rekonis ĝin. Mi memoras tre bone.

MONTELLO, Josué - *Cais da Sagração*,
4-a eldono, Nova Fronteira, Rio de Janeiro, 1976, p 135.

kvin konkursantoj sendis solvon por la dua traduko-defio aperinta en la antaŭa n-ro de Brazilei. La plej bona solvo, kun etaj korektoj, pluan fojon, venis el la urbo Natalo, ŝtato Norda Riogrando, nome de José Mário Marques, kiu estos regalata per libro-premio: *Postmortaj rememoroj de Brás Cubas*, verkita de Machado de Assis kaj tradukita al Esperanto de Paulo Sergio Viana.

Traduku la ĉi-suban elprenaĵon kaj sendu vian tekston rete al revuo@ileibr.org aŭ poŝte al la adreso de la Sekcio (vidu en la kolofono) plej malfrue ĝis la 30-a de majo 2008 . La plej bona solvo de traduko gajnos libro-premion.

Quando não sei onde guardei um papel importante e a procura se revela inútil, pergunto-me: se eu fosse eu e tivesse um papel importante para guardar, que lugar escolheria? Às vezes dá certo. Mas muitas vezes fico tão pressionada pela frase “se eu fosse eu”, que a procura do papel se torna secundária, e começo a pensar. Diria melhor, sentir.

E não me sinto bem. Experimente: se você fosse você, como seria e o que faria? Logo de início se sente um constrangimento: a mentira em que nos acomodamos acabou de ser levemente locomovida do lugar onde se acomodara. No entanto já li biografias de pessoas que, de repente passavam a ser elas mesmas, e mudavam inteiramente de vida. Acho que se eu fosse realmente eu, os amigos mão me cumprimentariam na rua porque minha fisionomia teria mudado. Como? não sei.

(LISPECTOR, Clarice - *A Descoberta do Mundo*,
eldonejo Nova Fronteira, Rio de Janeiro, 1984, p. 228)

supereblaj post iom pli da klarigo pri la afero.

Krom tio, la respekto, kiun ili donas al ni estas mirinda. Tio permesas al ni interŝanĝi multajn spertojn for de la esperanta movado. Tiu afero temas eĉ pri la homaj rilatoj, kiuj ne estas for de la esenco de la lingvo internacia.

Tiel ni konkludis, ke instrui al homoj, kiuj estas pli ol kvindek- aŭ sesdek-jaraĝaj, estas bonega sperto, kiu fruktdonos al nia karega Esperantujo.

Fajnoj de la metio

Unua leciono. Kursgvidanto kaj lernantoj amiketose sin prezentas. Minutojn poste, scivolaj oreloj atente akompanas la improvizatan paroladon de la instruanto. Ĉe la fino, kelkaj riskas demandon. Unu el la demandantoj provoke alparolas la kursgvidanton:

— Iam mi aŭdis, ke Esperanto estas ia miksaĵo de pluraj lingvoj...

Post garantii al la alparolinto, ke Esperanto ne estas tia lingva frankstejno, sed male, simpla, regula kaj facile lernebla lingvo, la instruanto, kvazaŭ defie, invitas la lernantojn ekkoni la genian eltrovon de la kreinto de Esperanto, nome la fonetikan alfabeton, kies prononceblon li tiel klarigas:

— En Esperanto estas nur kvin vokaloj, kiuj devas esti klare prononcataj kiel en la itala lingvo... La literon **C** oni prononcas kiel en la vorto ‘etcétera’ de la latina... La literon **H** oni prononcas elspire ¹ kiel en la vorto ‘help’ de la angla... La literon **Ĥ** oni prononcas gorĝe ² kiel la litero **J** de la hispana aŭ kiel la literparo **CH** de la germana... La literoj **M** kaj **N** ne devas esti nazaligataj kiel en la portugala kaj franca, sed malfermataj kiel en la germana... La litero **Ŭ**, kiun oni prononcas kiel mallonga ‘u-vokalo’, povas aperi komence de vortoj en propraj kaj geografiaj nomoj de aziaj lingvoj, ekz-e Ŭonbulismo...

— Aparte de la alfabeto de Esperanto, ni uzas ankaŭ specifajn literojn por fakaj kaj propraj nomoj: **W** = ĝermana “v” kaj **Y** = Ipsilono, ankaŭ konata kiel “i” greka...

Tenorjo

(1) konsonanto **Ĥ** ne estas gorĝa. Ĝi estas vela, frota k senvoĉa. Ĝia sonsimbolo laŭ la Internacia Fonetika Alfabeto (IFA) estas [x]. (Rim. de la revizianto). **(2)** Gorĝa estas konsonanto “h”, kiu ankaŭ estas frota k senvoĉa. Oni ankaŭ povas nomi ĝin “glota”. Ĝia sonsimbolo laŭ la IFA estas [h]. (Rim. de la revizianto)

PLIRIĈIGU VIAN VORTPROVIZON

Jen plia lingva ludo, ĉi-foje preparita de Edson Ponciano, por ke vi taksu vian vortprovizon. La elprenajoj venas el la libro *Beletro, sed ne el katedro*, de la franca esperantologo Gaston Waringhien, konsiderata la plej eminenta leksikologo kaj gramatikisto de la internacia lingvo. La duan eldonon, reviziitan kaj ampleksigitan, de la verko publikigis Flandra Esperanto-Ligo en 1987. Kontrolu poste, sur la sekva paĝo, la rezultojn de via memtaksado.



1. **Skolt/o** – A: Ano de gento loĝanta en Britio; B: aro da akompanantaj gardistoj; C: membro de junulara movado formcela; Ĉ: brando deistilita el hordeo.
2. **Stal/a** – A: konsistanta el tre malmola metalo; B: rilata al loĝejo, kie oni tenas brutaron; C: Eliganta sekan bruon; Ĉ: koncernanta muntadon kaj aranĝadon de io uzcele.
3. **Afin/o** – A: starigo de ĝusta sonrilato en muzikilo; B: aliigo de io aŭ iu al malpli dika formo; C: tio, kion oni pensas plenumi; Ĉ: altiriĝemo inter similecaj homoj.
4. **Princip/e** – A: antaŭ ĉio, pli ol ĉio; B: en la unua parto de afero aŭ ago; C: kiel reĝido, en eminenta maniero; Ĉ: laŭ la fundamento.
5. **Kohort/o** – A: grandnombra aro da homoj; B: ĉirkaŭbarita spaco antaŭ aŭ post domo; C: bando de malbonuloj; Ĉ: spaco por kulturado de fruktarboj.
6. **Mor/o** – A: arabo, kies tribo konkeris Hispanion; B: vivmaniero, kutimo; C: regularo pri ensocia homkonduco; Ĉ: malgajo de la humoro.
7. **Step/a** – A: rilata al pneŭo provizore neuzata; B: rilata al vastaj ebenaĵoj senarbaraj; C: eco de tiu, kiu preskaŭ falis pro mispaŝo; Ĉ: koncerna la tempoparton prezentantan gradon.
8. **Laz/e** – A: helpe de rimeno; B: eme nenion fari krom eviti laboron; C: per ilo kiu pliigas lumajn ondojn; Ĉ: dum libertempo.
9. **Gal/o** – A: korta birdo ruĝkresta; B: surkapa bulforma elstaraĵo; C: amara likvaĵo hepata; Ĉ: ano de kelta gento.
10. **Driv/i** – A: direkti ian ajn veturilon; B: devenigi vorton de alia pli simpla; C: deflankiĝi de la difinita vojo; Ĉ: frote eluzadi ion.

- Skolto** – [C] membro de junulara movado formcela. “...*kun junula orgojlo de skolto-esploristo ...*” (p. 71) [Opcio A = skoto]; [Opcio B = eskorto].
- Stala** – [B] rilata al loĝejo, kie oni tenas brutaron. “...*girfalkoj flugas el naskiĝejo stala*” [p. 156] [Opcio A = ŝtala]; [Opcio Ĉ = instala].
- Afino** – [Ĉ] altiriĝemo inter similecaj homoj. “*Li per mirindega elekta afino...*” (p. 142) [Opcio A = agordo].
- principe** – [Ĉ] laŭ la fundamento. “*La rolo de detektivo estas principe duobla...*” (p. 27) [Opcio A = precipe]; [Opcio B = komence]; [Opcio C = prince].
- Kohorto** – [A] grandnombra aro da homoj. “*La ekzisto de tia kohorto estis tre fruktodona.*” (p. 87) [Opcio B = korto]; [Opcio C = hordo]; [Opcio Ĉ = horto].
- Moro** – [B] vivmaniero, kutimo. “...*mi, hungaro, ŝtelis kisojn sekvante la moron...*” (p. 37) [Opcio A = maŭro]; [Opcio C = moralo]; [Opcio Ĉ = morozo].
- Stepa** – [B] rilata al vastaj ebenaĵoj senarbaraj. “...*primitivaj animoj de la stepaj nomadoj...*” (p. 15) [Opcio Ĉ = stadia].
- Laze** – [A] helpe de rimeno. “...*kiu laze kaptadis la ĉaminojn...*” (p. 178) [Opcio C = lasere].
- Galo** – [C] amara likvaĵo hepata. “*Mi havas la amimon de kolombo, la galo al mi mankas...*” (p. 27) [Opcio Ĉ = gaŭlo].
- Drivi** – [C] deflankiĝi de la difinita vojo. “...*mi lasas min drivi al sensekva revado.*” (p. 39) [Opcio Ĉ = trivi].

Kontrolu vian memtaksadon:

Malpli ol tri trafaj respondoj: vi nepre bezonas legi iom pli.

3 – 4: **bona**; 5 – 7: **bonega**; 8 – 10: **escepta**

GEGLIA: RIENCO



POST SEP HOROJ
ĈU VI VOLAS FIŜKAPTI?


NE, MI NE
HAVAS
PACIENCON!



Ulysses Baldez



Kaŝu viajn retkontaktojn



La instruisto Lucas Yassumura, el la urbo Jundiaí, ŝtato San-Paŭlo, iniciatis perretan kampanjon “Kaŝu viajn retkontaktojn”. La iniciato estas interesa kaj tial ni reproduktas la tekston de lia mesaĝo:

“Okaze de sendado de retmesaĝo, uzu ĉiam la opcio **CCO** (*Com Cópia Oculta*, portugale) aŭ **BCC** (*Blind Carbon Copy*, angle) anstataŭ **PARA** aŭ **TO**. Ni ne rajtas lasi publikaj la retadresojn de niaj kontaktoj. Kaŝu la retadresojn de viajn amikojn antaŭ ol sendi iun mesaĝon. Malfaciligu la multobligon de virusoj kaj spamaĵoj.”



Kovrilo de la komikso-albumo en Esperanto

La bildrakonta aventuro daŭras...

Rat-Man, la plej sukcesa numtempa komikso en Italio,
parolas ankaŭ en Esperanto.

Vizitu la Projekton RoMeo kaj konatiĝu kun la flava ratulo
<http://www.pecorelettriche.it/esperanto/romeo/default.asp>



edukado.net

**... de la jaro 2001
ŝirmas kaj orientas
kursgvidantojn ĉie
en la mondo.**

edukado.net